*****************************************************************************

**INSTRU-CIRKULERO 2012/2 (septembro 2012)**

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

*****************************************************************************

Karaj Gekolegoj,

Mi esperas, ke dum la somero vi ĉiuj agrable ripozis kaj refreŝiĝis. Mi provas resumi la eventojn, gravajn informojn ekde majo, la dissendo de nia lasta cirkulero.

# I. Venontaj gravaj trejnsesioj, konferencoj:

**1. TORPEDo 8 (septembro 28-oktobro 3 2012)** la Tradicia Oktobra Renkontiĝo PEDagogia (samtempe **56a studsesio**) okazos en Herzberg am Harz, organizata de AGEI (landa sekcio de ILEI) kaj Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg.

Ĝi traktos 2 ĉeftemojn:
1. la rolo de artoj en motivado, instruado. Kiel ni uzu desegnadon, pentraĵojn, muzikon, kantojn, teatrajn ludojn dum la lecionoj? Kiel ni instigu lingvolernadon per arto, artaĵoj?
Temogvidantoj: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy

2. internaciaj, ekstermovadaj projektoj, subvenciebloj. Springboard kaj Comenius-projektoj, projekto PUNTO (partnerurba kunlaboro).
Invitita prelegonto: Tim Morley (Britio) pri spertoj en Springboard kaj Comenius-projektoj

Ni planas ankaŭ forumon pri edukaj-movadaj temoj kaj el la ICH-biblioteko aparte okupiĝi pri sciencaj revuoj kaj komparado de lernolibroj, lernmaterialoj.
Okazos ankaŭ kunsido por organizi la 46an ILEI-konferencon en somero 2013 en Germanio.

Bonvenon al ĉiuj studemuloj, interesiĝantoj! Spertinterŝanĝo, novaĵoj pri Esperanto-instruado, instrumetodoj. Kotizo: 40 EUR pagenda al
1. En Germanio: Esperanto-Gesellschaft Südharz en 37412 Herzberg; kontonumero: 101457927, bankindikilo (BLZ): 26351015
2. internacie: (IBAN) DE28263510150101457927 SWIFT/BIC: NOLADE21HZB
3. UEA-konto ikch-a

Aliĝu ĉe: Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6
Rete: esperanto-zentrum@web.de aŭ zsofia.korody@esperanto.de Tel, fakso: 0049-55215983
Ankaŭ parttempa partopreno eblas! Koran bonvenon!

**2. KLERIGKURSO, STUDSESIO ĉe Germana Esperanto-Centro en Herzberg**
Oferto de la Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo en 2012 pri instrukapabligo, movada trejnado.
Detaloj: http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=61311937
Jarkalendaro por 2012: http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910
La sekva (57a) Studsesio: decembro 14-16: (studmodulo kaj Zamenhof-festo la 15an de decembro okazonta en la Esperanto-Hotelo Zum Pass en Herzberg/Sieber)
Ĉeftemoj: Esperanto kaj muziko, Esperanto kaj filmoj, historio: rerigardo al la 125-jara ekzisto de la lingvo. Temogvidantoj: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy

**3. BILDUNGSURLAUB: Klerigocela forpermeso, enkadre de KVHS-kurso**
**Esperanto-Bildungswoche 04-08.03.2013 en Germana Esperanto-Centro, Herzberg am Harz**
Por komencantoj kaj ankaŭ por progresintoj. Niveloj dividitaj laŭ bezono. Tre intensa, tre efika lingvolernado, plenkreskula pluklerigado post du tre sukcesaj kursoj nun la trian fojon ofertata de Zsófia Kóródy. Aliĝu ĉe Interkultura Centro Herzberg, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6
zsofia.korody@esperanto.de aŭ/kaj ĉe KVHS Osterode
http://www.kvhs-osterode.de/kursdetails.php?KursID=12083
Detalojn, sciindaĵojn pri "Bildungsurlaub" bv. legi ankaŭ sur la paĝaro de GEA
http://esperanto.de/gea/bildung.html

**4. 46a ILEI-KONFERENCO en Herzberg am Harz (urboparto Sieber) 12-18. julio 2013**
**Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj**

En 2013 – post konferenco en Azio kaj antaŭ verŝajna serio de konferencoj ekster Eŭropo – ILEI organizos sian 46-an konferencon en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz. Ĝi okazos semajnon antaŭ UK kun postkonferenca vetureblo al Rejkjaviko, Islando.

**Konferenca temo:** La loĝantaro en multaj landoj aĝiĝas, la zorgado pri la juna kaj maljuna generacioj estas grava tasko. Kulturaj kaj klerigofertoj por ĉiuj generacioj aperas ekz. en la eŭropa 'Dumviva Lernado' programo, el kiu foje-foje ankaŭ Esperanto-projektoj ricevadas subvenciojn.
Kion ni lernu el tiuj projektoj? Kiun strategion ILEI ellaboru kaj sekvu, kiujn metodojn ni uzu por realigi Esperanto-instruadon de frua infanaĝo ĝis la t.n. tria generacio?
Kiel ni kunlaboru kun neesperantistaj fakaj asocioj, institucioj, ktp.? Jen vasta temaro por analizi kaj trakti kune dum nia konferenco en 2013.
**Rabatitaj kotizoj:** por tiuj, kiuj pagas ĝis 31.12.2013: A-landoj – 40 EUR, B-landoj – 25 EUR
Premiaj rabatoj: 50% por la 50-a kaj 100% por la centa aliĝintoj.
**Loĝado, manĝado, ekskursoj** kaj aliaj servoj pagendas aparte.

**Kotizoj**
ĝis 31.03.2013: A-lando/ILEI-membro: 50 EUR, ne ILEI-membro: 65, junulo/handikapulo: 25 EUR
ĝis 30.06.2013: A-lando/ILEI-membro: 60 EUR, ne ILEI-membro: 75, junulo/handikapulo: 30 EUR
post 30.06.2013: A-lando/ILEI-membro: 70 EUR, ne ILEI-membro: 90, junulo/handikapulo: 35 EUR

ĝis 31.03.2013: B-lando/ILEI-membro: 30 EUR, ne ILEI-membro: 40, junulo/handikapulo: 15 EUR
ĝis 30.06.2013: B-lando/ILEI-membro: 35 EUR, ne ILEI-membro: 45, junulo/handikapulo: 20 EUR
post 30.06.2013: B-lando/ILEI-membro: 45 EUR, ne ILEI-membro: 55, junulo/handikapulo: 25 EUR

Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco;
Junulo estas konsiderata tiu, kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1979.
Handikapulo bonvolu sendi al ILEI atestilon.
Aliĝkotizo por unu tago estas 25 EUR por A- kaj B-landoj.

## II. Pasintaj gravaj eventoj:

**1. KOMUNA IFEF-ILEI SEMINARIO** dum la 64a IFEF-kongreso en Herzberg okazis sub gvido de Stefan MacGill, kiu prezentis apartan instrumaterialon por fervojistoj. Raportoj, gazetartikoloj pri la kongreso, detaloj pri la dumkongresaj trejnsesioj estas troveblaj ĉe
http://ifk64.esperanto-urbo.de/page.php?pid=60381095
http://ifk64.esperanto-urbo.de/page.php?pid=11940824
http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=29458610

**2. ESPERANTO 125**
En pluraj lokoj oni aliĝis al la alvoko de UEA kaj ILEI kaj okazis prezentadoj, ekspozicioj, programoj rilatantaj al la grava jubileo de nia lingvo. Dankon kaj gratulojn al ĉiuj, kiuj kontribuis per tio al varbado, informado pri Esperanto, montris atingaĵojn kaj alvokis al la nuna uzeblo de la lingvo.

GEA anoncis apartan novan lerneblon kun libropremio: http://esperanto.de/jubileo/index.html
*Der Deutsche Esperanto-Bund e.V. lädt zum Jubiläumsjahr 2012 alle Sprachinteressierten und Neugierigen ein, die Anfangsgründe von Esperanto kennen zu lernen.*
*Hier findet man 2 Lektionen des Lehrwerks "Esperanto im Dialog / Esperanto en dialogo". Sie führen schon weit in die Sprache ein.*
*Wer am Ende seinen Erfolg kontrollieren möchte, kann einige Übungsaufgaben lösen und einsenden. Die ersten 1.000 erfolgreichen Teilnehmer erhalten dann ein zweisprachiges Buch (Deutsch/Esperanto) kostenlos als Prämie.*

Okaze de la 125-jara jubileo de Esperanto – inter 13-20 kaj 20-27 julio la unuan fojon ofertis Interkultura Centro Herzberg 2-semajnan intensan someran lingvokurson kun pedagogia-metodika faka trejnado en Herzberg am Harz. Dum tiu periodo la lernado okazis en 2-3 paralelaj grupoj laŭ lingva kapableco sub gvido de Peter Zilvar, Christof Krick, Sebastian Kirf kaj Zsófia Kóródy.
La komencantoj montris rapidan evoluon de A1/2 niveloj al B1, la pli spertaj en B2, C1 niveloj partoprenis lingvan-metodikan trejnadon, aŭskultis prelegojn, diskutis pri Esperanto-kulturo, literaturo, historio, movadaj temoj kaj ekzamenoj. La temaro sekvis la modulojn ellaboritajn laŭ ILEI-normoj. La biblioteko de ICH ofertis bonan bazon por praktika laboro kaj memlernado, perfektiĝo. Dum la kurssemajnoj la partoprenantoj ĝuis plurajn ekskursojn al la regiono, gvidatan urborigardadon kaj oftan komunan amuzan vesperan distradon.
Detaloj ĉe http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=57831728

**La Germana Esperanto-Centro (kun sidejo de AGEI), la ordigita biblioteko kun speciala pedagogia-metodika fakkolektaĵo estas je dispono por ĉiuj lernemuloj, studemuloj. Bonvenon!**

**3. AGEI-JARĈEFKUNVENO / KOMUNA ESPERANTO-KONGRESO 2012**
La ĉi-jara, 89a GEA-kongreso en Berlin estis speciala evento, ja ĝi samtempe estis ankaŭ Komuna Esperanto-Kongreso kun Danlando kaj Pollando kun la ĉeftemo: Partneroj en Eŭropo. AGEI-prezidanto Zsófia Kóródy kontribuis al la programo per prelegoj pri Grundtvig-projekto, pri "Esperanto kiel oficiala pontlingvo por ĝemelurbaj rilatoj", pri "125-jara Esperanto: kion instruas tio al instruistoj?"

Dum la kongreso sub la gvido de AGEI-prezidanto, Zsófia Kóródy, okazis la AGEI-jarĉefkunveno., kiun partoprenis ankaŭ la prezidanto de ILEI, Stefan MacGill.
Resumo, albumo, fotoj: http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=25443179
La jarraporton ni pretigas ĉiujare kaj sendas al ILEI. Al niaj membroj sen interretadreso mi aldone sendas, aliaj trovas ĝin ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652
Ĉi-jare okazis novelekto de la estraro. La ĝisnunaj estraranoj estis reelektitaj: prezidanto: Zsófia Kóródy, vicprezidanto: Dr. Rudolf Fischer, kasisto: Christof Krick, estrarano: Harald Schmitz

**Sekva AGEI-jarĉefkunveno: dum GEK (17-20.05.2013) en Nürnberg**
Detaloj, aliĝeblo: http://www.esperanto-nuernberg.de/e/eo/770063/main/gekextern

**4. KER-EKZAMENOJ TUTMONDE**

**07-10.06.2012** en Herzberg okazis intensaj lingvokursoj en pluraj niveloj, preparo al KER-ekzamenoj.
**09.06.2012:** La unuan fojon okazis tutmonda ekzamensesio laŭ la postuloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Ankaŭ en Herzberg eblis trapasi la ekzamenon en la niveloj B1, B2 kaj C1. En 29 ekzamenlokoj dise en la tuta mondo samtempe okazis skribaj ekzamenoj.
En Herzberg **ankaŭ la parola parto** estis trapasita de 7 kandidatoj. Koran gratulon al ili!
En Germanio ĝis nun 47 personoj havas KER ekzamen-atestilojn: 11 B1, 14 B2 kaj 22 C1 diplomojn.

**5. 45a ILEI-KONFERENCO 20-26 julio 2012**
La 45a ILEI konferenco okazis en Kunming, Ĉinio kun 113 aliĝintoj el 19 landoj. La konferenca temo estis: La arto de komunikado, komunikado de artoj. Dum la konferenco okazis komitatkunsido kaj **novelekto de la estraro por la periodo 2012-2015:**
Prezidanto: Stefan MacGill, kunordigo, partneroj, regularoj, kurso 125, Juna amiko.
Sekretario: Radojica Petrović, sekretariaj taskoj, edukprojektoj kaj konferencoj.
Estrarano pri financoj: Vilĉjo (Bill) Harris, financaj kaj kasistaj aferoj.
Vicprez.: Zsófia Kóródy, LKK de la 46a konferenco, E-centroj, instrukapabligado, ekzamenoj.
Vicsekr.: s-ino Magdaléna Feifičová (Fejfi), membro-administrado, rilatoj kun aliaj fakaj asocioj.
Estrarano: Gong Xiaofeng (Arko), azia agado, universitata agado.
Estrarano: Bharat Ghimire, eksteraj rilatoj, universitata agado.
Estrarano: Enikő Zengő Sereghy, instrukapabligo, ekzamenoj, kalendaro, membro-varbado.
Estrarano: Penny Vos, landa kaj lerneja agado, eksteraj rilatoj, instrumaterialoj, reta kontaktado.

**6. ĴUS APERIS**

"Der Lateinkalender 2012 - Sentenzen von Cicero in 12 Sprachen übersetzt (al Esperanto tradukita far s-ro Bernhard Schwaiger el Erfurt). Vi povas mendi la grandformatan latinkalendaron 2013 ĉe: Internats-Gymnasium Pädagogium Bad Sachsa, Ostertal 1-5, 37441 Bad Sachsa
Tel. 05523-300112, E-mail: kontakt@internats-gymnasium.de aŭ ĉe:
Gerhard Postweiler, e-mail: gpostweiler@t-online.de

**7. COMENIUS-PROJEKTOJ**

Kun granda ĝojo ni informas vin, ke post kelkjara paŭzo post la sukcesa Comenius-projekto (2008-2010) inter lernejoj en Herzberg am Harz, Bar Hill (GB) kaj Miskolc (HU), post pluraj provoj nun ekstis aprobitaj novaj Comenius-projekto kun Eŭropaj subvencioj, en kiuj partoprenas du lernejoj el Germanio en la periodo 2012-2014.

**Projekto 1**: La akceptita temo estas: La diversaj profesioj – transformi la provokojn en eblon realigi siajn revojn. Partoprenas lernejoj el Bulgario, Rumanio, Litovio, Italio kaj Gimnazio en Winterberg, Germanio. La germanan lernejon reprezentos Christof Krick.

**Projekto 2:** La akceptita temo estas: Vizito de la loka kastelo al la Eŭropa Domo. Partoprenas EMA gimnazio en Herzberg am Harz, Germanio, mezlernejoj en Győr, Hungario kaj Mazaradelvalo, Italio. Kiel kvara partnero povos aldoniĝi lernejo el Zagreb, momente en atendolisto. La projekton ellaboris kaj gvidos Zsófia Kóródy kaj Ewa Kukielka el Herzberg.

**III. AKTUALAĴOJ**

**1. NOVA LERNOJARO, NOVAJ KURSOJ 2012-2013**

Mi petas ĉiujn gekolegojn registri, aktualigi siajn kursojn, Esperanto-klasojn, universitatajn grupojn, ktp. ĉe http://edukado.net kaj ĉe http://www.esperanto.de/dej/kursoj/listo/

**2. FAKLIBROJ**

Por helpi instruadon, lernadon, prepariĝon al KER-ekzameno ni povas oferti la sekvajn librojn:
- **Detala gramatiko de Esperanto**. 217 paĝoj. 210x145. Eldonis ILEI, e@i kaj la retejo <lernu.net> en 2010. ISBN 9788089366095. Prezo: 12 EUR plus 10% por sendokostoj.
- **Manlibro pri la instruado de Esperanto**. 150 paĝoj. 210x145mm. Eldonis ILEI, kaj E@I. Tria eldono: 2008. ISBN 80-969042-6-4. Prezo: 8,50 EUR plus 10% por sendokostoj.
- **Esperanto de nivelo al nivelo** (preparlibro al la UEA-KER ekzamenoj B1, B2, C1). Eldonis Idegennyelvi Továbbképző Központ. Budapest. 2008. 136 paĝoj. Prezo: 10.50 EUR plus sendokostoj.

Mendu ilin ĉe Zsófia Kóródy, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6

**3. MEMBROKOTIZO POR 2013**

La membrokotizo por AGEI restos 25 EUR ankaŭ en 2013. Se vi ne donis enkasigrajton al la kasisto de AGEI (Christof Krick), bv. ne forgesi pagi vian membrokotizon kaj renovigi vian membrecon por ricevi la fakan gazeton IPR (la membrokotizo enhavas la abonon). Ankaŭ novaj membroj estas bonvenaj.
Konto: Volksbank Schmallenberg, BLZ 46062817, Konto Nr. 5187110500
Bv. informi nin, se vi havas novan adreson, retadreson.

Dezirante al vi belan aŭtunon, sukcesajn kursojn, rezultodonan agadon por Esperanto,

Herzberg am Harz, 20.09.2012

Zsófia Kóródy
komisiito de GEA por instruado
prezidanto de AGEI
zsofia.korody@esperanto.de